

Nova libro: Mio, mia filo
de Astrid Lindgren.

Tradukis: Leif Nordenstorm.
144 p. 20 cm. Prezo: 125 SEK.

Infana libro de mondkonata verkistino. Boĉjo estas zorgato ĉe Sinjorino Edla kaj sinjoro Sixten. Li scias ke lia patro ne estas ĉifononulo. Li ekscias ke lia patro estas reĝo en la Lando Foro. La vivo en tiu lando tamen ne estas tute feliĉa, ĉar en la apuda lando Ekstera, loĝas la kruela kavaliro Ĥato.

Mendu ĉe / Beställ från
www.algonet.se/~eldona
aŭ en Masthuggsliden 1.

Membrogazeto de Esperanto-Societo de Gotenburgo/
Medlemstidning för Göteborgs Esperantoförening: *inter-LIGILO*.
Abonprezo al eksterlando 7,50 €, retpoŝta versio senpaga.
Prenumerationspris 100 kronor, e-postversion gratis.
Responda eldonanto/
Ansvarig utgivare: Andreas Nordström, tel. 031-52 59 72.
Redaktantoj/
Redaktion: Andreas Nordström och Anita Dagmarsdotter.

***inter-LIGILO*, Esperanto-Societo de Gotenburgo,**
Masthuggsliden 1, SE-413 18 Göteborg, Svedio

Föreningslokalen är öppen tisdagar 18-19, ofta längre. Sommar och jultid stängt

Tel: 031-12 05 94,
el eksterlando: +46-(0)31-120594
Poŝtĝira konto/
Plusgirokonto: 4 36 12-1
UEA-kod: esgo-l

Retpoŝto/
E-post: gbg@esperanto.se
Retpaĝo/
Hemsida: http://esperanto-gbg.org

För information om ev. ändringar i vårt program: ring vår telefon 031-12 05 94 eller se vår hemsida http://esperanto-gbg.org > Aktuellt

n-ro 3:2006

inter-LIGILO

Membrogazeto de Esperanto-Societo de Gotenburgo

Höstens program

Följande tisdagar kl 18:30 på Masthuggsliden 1. Kaffe och kaka serveras. Välkommen!

19 september
Ekon från sommaren
Vi träffas och delar med oss vad vi gjort under sommaren. Ta gärna med bilder.

17 oktober
Finska och svenska - inte *så* olika
Kaarlo Voionmaa berättar om finska språket från svensk horisont.

14 november
Allsång på Masthugget
Siv Burell leder oss i allsång.

La aŭtuna programo

La sekvaj mardoj 18h30 en Masthuggsliden 1. Kafo kaj kuko. Bonvenon!

19 septembro
Someraj eĥoj
Ni dividos inter ni kion ni faris dum la somero. Volonte kunprenu bildojn.

17 oktobro
La finna kaj la sveda - ne *tiom* distancaj
Kaarlo Voionmaa rakontos pri la finna lingvo el sveda horizonto.

14 novembro
Komuna kantado en Masthugget
Siv Burell gvidos nin en la kantado.

Upplysningar om sista-minuten-ändringar ges av välkomstmeddelandet på föreningens telefonsvarare 031-12 05 94.

Höstens övriga aktiviteter

Internationella Lövgärdetdagen 9 september

Vår förening kommer även i år att vara representerad under Internationella Lövgärdetdagen lördag 9 september kl. 12–17. Plats: HGF:s södra lokal vid kyrkan i Lövgärdets centrum; på torget vid vackert väder, inomhus vid regn. Vi informerar om vår förening och om esperanto. En utställning kommer att visas. Kom gärna och besök oss! Frivilliga medhjälpare sökes också.

Europeiska språkdagen 26 september

Tisdagen den 26 september infaller Europeiska språkdagen och det blir ett arrangemang på Språkcaféet på Esperantoplatsen. Vår förening medverkar även detta år. Kom gärna kl. 18 till Språkcaféet och ta en fika och prata esperanto! Frivilliga medhjälpare sökes också.

Arbetskvällar i vår lokal

infaller tisdagarna 5 september, 3 och 31 oktober kl 18. Kom och hjälp till att äntligen få ordning på bokhyllor och annat som behöver göras. Välkommen!

Öppet hus

Varje tisdag har vi öppet hus i vår lokal på Masthuggsliden 1, åtminstone mellan kl. 18 och 19. Vid olika aktiviteter längre öppethållande.

La ceteraj aktivaĵoj de la aŭtuno

La internacia tago de antaŭurbo Lövgärdet 9 septembro

Nia klubo ankaŭ ĉi-jare estos reprezentita dum La internacia tago de antaŭurbo Lövgärdet sabaton 9 septembro inter 12–17 h:j. Loko: La suda lokalo de HGF ĉe la preĝejo en la centro de Lövgärdet; en la placo ĉe bona vetero, endome se pluvos. Ni informos pri nia klubo kaj pri Esperanto. Ekspozicio ankaŭ troviĝos. Volonte venu kaj viziti! Ni ankaŭ serĉas volontulojn.

La eŭropa tago de la lingvo 26 septembro

Marde 26 septembro okazos La eŭropa tago de la lingvo kaj estos aranĝo en kafejo Språkcaféet en placo Esperantoplatsen. Ni klubo partoprenos ankaŭ ĉi-jare. Volonte venu je 18h al Språkcaféet por kafumi/teumi kaj babili Esperante! Ni ankaŭ serĉas volontulojn.

La laborvesperoj en nia lokalo

okazos la mardojn 5 septembro, 3 kaj 31 oktobro je 18h. Venu kaj helpi finfine ordigi la librobretarojn kaj aliaj farendaĵoj. Bonvenon!

Malferma domo

Ĉiun mardon ni havas malferman domon en nia lokalo en strato Masthuggsliden 1, almenaŭ inter 18 kaj 19 h:j. Ĉe la diversaj aktivecoj pli longe malfermita.

vår deltagare. Där drack vite och smörgås och hade det riktigt gemytligt.

Tisdag 15 augusti

inträffade sommarens sista träff, denna gång på Rosenkaféet i Trädgårdsföreningen. Fyra deltagare. Före träffen hade ett par av deltagarna besett rosengården och palmhuset. Vi fikade i kaféets trädgård, trots att regnmolnen såg hotande ut, men det kom aldrig mer än några stänk.

La someraj ekskursoj kaj kafejrenkontiĝoj

Marde 13 junio

ni faris ekskurson al insulo Styrsö en la Gotenburga arkipelago. Sep partoprenantoj. Estis bela vetero kaj post agrabla veturo per la ŝipeto de Saltholmen ni iris al kafejo Öbergskas, kie antaŭmenditaj sandviĉoj kun salikokoj atendis nin. Ni sidis en la kafeja ĝardeno kaj poste ni promenis tra la insulo. Tie ni renkontis la fratinon de Anita, Harriet, kiu loĝas en la insulo. Ŝi kunprenis la plejmulton de la partoprenantoj ĝis la plej alta pinto de la insulo kun vasta panoramo, i.a. oni klare povis vidi Vinga, la plej ekstreman insulon de la gotenburga arkipelago. La ceteraj prenis malpli krutan vojon al la kajponto, ĉe kiu ni rerenkontiĝu por la reveturo, t.e. alia kajponto ol tiu, al kiu ni alvenis al la insulo.

Marde 11 julio

kvar kuraĝaj personoj renkontiĝis en la Botanika ĝardeno de Gotenburgo, kvankam jam pluvis dum la tuta tago. Sed la ĉielo aspektis sereniĝi. Sed kiam ni alvenis al la restoracio Paviljongen en la ĝardeno, komencis pluvi denove. Aldone al la malbonaĵo la restoracio estis fermita antaŭtempe pro la malbona vetero. Tiam unu el la partoprenantoj invitis nin al sia hejmo, ĉar ŝi loĝas proksime. Sed survoje reen al la tramhaltejo, komencis pluvegi, kaj do estis tre bonvene veni en la varmon de la hejmo de nia gastigantino. Tie ni trinkis teon, manĝis sandviĉojn kaj havis tre agrablan tempon.

Marde 15 aŭgusto

okazis la lasta renkontiĝo de la somero, ĉi-foje en kafejo Rosenkaféet en parko Trädgårdsföreningen. Kvar partoprenantoj. Antaŭ la renkontiĝo kelkaj el la partoprenantoj spektis la rozĝardenon kaj la plantdomon de palmoj. Ni kafumis en la kafeja ĝardeno, kaj kvankam la nuboj aspektis minacantaj, ne falis pli ol kelkaj akvogutoj.

Styrsö – foto: Anita Dagmarsdotter

Sommarens kaféträffar och utflykter

Tisdag 13 juni

gjorde vi en utflykt till Styrsö. Sju deltagare. Det var fint väder och efter en härlig tur med båten från Saltholmen gick vi till Öbergskas café, där förbeställda räksmörgåsar väntade oss. Vi satt ute i caféets trädgård och sedan gjorde vi en promenad över ön. Där träffade vi Anitas syster Harriet, som är bofast på ön. Hon tog med merparten av deltagarna upp på öns högsta punkt med en vid utsikt, bl.a. syntes Vinga mycket tydligt. De övriga tog en mindre brant promenad till den brygga, där vi skulle samman-stråla inför återfärden, dvs en annan brygga än den vi angjorde när vi kom till ön.

Tisdag 11 juli

träffades i Botaniska trädgården fyra modiga personer, som hade vågat sig ut, trots att det hade regnat hela dagen. Men det såg ut att bli uppehåll framåt kvällen. Men när vi kom fram till trädgårdens restaurang Paviljongen, började regnet igen. Till råga på eländet hade restaurangen stängt tidigare den dagen pga vädret. Då föreslog en av deltagarna att vi skulle gå hem till henne istället, eftersom hon bor i närheten. På tillbakavägen till spårvagnshållplatsen övergick regnet till skyfall, så det var skönt att få komma inomhus i värmen hemma hos

Höstens kurser

Träffar på Språkcaféet

Höstens träffar på Språkcaféet på Esperantoplatsen, då vi träffas, fikar och pratar esperanto (så gott vi nu kan), infaller kl 17 följande onsdagar: 13 september, 11 oktober och 8 november. (Datum i december meddelas i nästa nummer.) Ledare är Siv Burell. Ingen föranmälan behövs, och ingen avgift, men det förväntas att man köper något från caféet.

Nybörjare

Det finns tyvärr ingen som kan leda en nybörjarkurs i höst. Om du är intresserad av att bli cirkelledare, hör gärna av dig till Anita tfn 031-555337, e-post anidag()telia.com eller till Andreas, tfn 031-525972, e-post arendsian()hotmail.com

Fortsättning

Söndagar kl. 17–19 med start 24 september på Masthuggsliden 1. Kursavgift 200 kr exkl. lärobok. Ledare Anita Dagmarsdotter. Anmälan till ledaren, tfn 031-555337, e-post anidag()telia.com

Konversation

Första onsdagen i varje månad, dvs 6 september, 4 oktober, 1 november och 6 december kl. 18–20 på Masthuggsliden 1. Vi träffas och pratar esperanto, i första hand om böcker vi läser eller läst. Ledare Magnus Henoch. Avgift 30 kr/gg inkl. fika. Ingen föranmälan behövs. För frågor: Magnus, tfn 0732-457208, e-post: mange()freemail.hu

Niaj aŭtunaj kursoj

Renkontiĝoj en Språkcaféet

La aŭtunaj renkontiĝoj en kafejo Språkcaféet en placo Esperantoplatsen, kiam ni kafumas/teumas kaj babilas Esperante (laŭ nia kapablo), okazos je 17h en sekvaj merkredoj: 13 septembro, 11 oktobro kaj 8 novembro. (Dato por decembro venos en la venonta numero.) Gvidanto estas Siv Burell. Neniu antaŭanonciĝo bezonata, kaj neniu kotizo, sed oni atendas, ke oni aĉetas ion de la kafejo.

Komencantoj

Bedaŭrinde ni havas neniun kiu povas gvidi kurson por komencantoj ĉi-aŭtune. Se vi interesiĝas fariĝi gvidanto, volonte kontaktu Anita tel 031-555337, rete anidag()telia.com aŭ

Andreas, tel 031-525972, rete arendsian()hotmail.com

Progresantoj

Dimanĉe inter 17 kaj 19 h:j kun starto 24 septembro en Masthuggsliden 1. Kotizo 200 SEK ekskl. lernolibro. Gvidanto Anita Dagmarsdotter. Anoncu vin al la gvidanto, tel 031-555337, rete anidag()telia.com

Konversacio

La unuan merkredon ĉiumonate, t.e. 6 septembro, 4 oktobro, 1 novembro kaj 6 decembro inter 18 kaj 20 h:j en Masthuggsliden 1. Ni renkontiĝas kaj babilas Esperante, ĉefe pri libroj, kiujn ni legas/legis. Gvidanto Magnus Henoch. Kotizo 30 SEK/fojo inkl. kafo kaj kuko. Neniu antaŭanonciĝo bezonata. Por demandoj: Magnus, tel 0732-457208, rete: mange()freemail.hu

Nitobekonferens i Göteborg 14–17 juni

Deltagare från Ryssland, Serbien, Tjeckien m.fl. länder hade kommit till Göteborgs universitet för att vara med på en s.k. Nitobekonferens. Nitobecentret är en organisation för språkdemokrati som vill stimulera till debatt om internationell demokrati och jämlik språkpolitik, i synnerhet inom EU. Man föreslår esperanto som en lösning på dessa problem. Centret anordnar bl.a. konferenser i samarbete med olika institutioner och försöker bjuda in sakkunniga och politiker. På lördagen 15 juni hölls ett miniseminarium, som ingick in konferensen, öppen för allmänheten. Tyvärr var endast esperantokunniga personer närvarande, förutom en; man frågade nämligen de närvarande vilka som kunde esperanto, och den enda som inte räckte upp handen var prof. Jens Allwood från institutionen för lingvistik. Å andra sidan fick konferensen Allwood att bli intresserad av esperanto! Mer om det i nästa nummer.

På lördagskvällen hade Siv Burell ordnat med en buffé för konferensdeltagare och lokala esperantister på Språkcaféet. Efter trevlig samvaro på kaféet avslutades kvällen med en promenad längs hamnen, för att se på folkfesten i samband med Götatunnelns invigning.

Nitobecentro

Nitobekonferenco en Gotenburgo 14–17 junio

Partoprenantoj el Rusio, Serbio, Ĉeĥio k.a. landoj venis al la universitato de Gotenburgo por partopreni en t.n. Nitobekonferenco. La Nitobecentro por lingva demokratio estas organizo, kiu volas stimuli publikan debaton pri internacia komunikado kaj egaleca lingvopolitiko, precipe en la Eŭropa Unio. Oni proponas Esperanton kiel solvon. La centro i.a. aranĝas konferencojn en kunlaboro kun diversaj institucioj kaj invitas ekspertojn kaj politikistojn. Sabate 15 junio oni havis, kiel eron de la konferenco, malgrandan seminarion, malferman al la publiko. Bedaŭrinde nur esperantistoj ĉeestis krom unu; oni nome demandis pri tiuj, inter la ĉeestantoj, kiuj scias Esperanton, kaj la sola, kiu ne levis la manon, estis prof. Jens Allwood el la institucio de lingvistiko. Aliflanke la konferenco interesigis Allwood pri Esperanto! Pli pri tio en la venonta numero.

En la sabatvespero Siv Burell aranĝis bufedon por la konferencanoj kaj la lokaj esperantistoj en kafejo Språkcaféet. Post agrabla kunestado en la kafejo la vespero finiĝis per promenado laŭ la haveno, por vidi la popolfeston okaze de la inaŭguro de novkonstruita aŭtotunelo sub la urbo.

Nitobe, Språkcaféet – foto: Siv Burell